

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Vi aŭdas Claude Gacond, kiu prelegas pri Charles Ecabert.

Kun granda emocio mi hodiaŭ adiaŭas al tre kara samideano, kies voĉon vi bedaŭrinde nur povis aŭdi dum kelkaj elsendoj. Charles Ecabert esperantiĝis nur antaŭ tri jaroj dum gravega manifestacio « Esperanto en la lernejo », kiu okazis en la gimnazio de la urbo Neuchâtel. Li partoprenis nian aranĝon pro multaj kaŭzoj : unue ĉar ĉiuj lingvaj problemoj lin interesis. Ofte ni lin aŭdis diri : « La lingvo estas la ĉefa motoro de la civilizacio : riĉa temo por meditado kaj agado ». Li ĉeestis nian kunvenon due por konatiĝi kun Edmond Privat kaj Pierre Bovet, la prelegintoj, trie por ekzameni kiel kantas kaj recitas la 19 esperantistaj gelernantoj de la du ĵurasaj vilaĝetoj Les Bois kaj La Sagne, kaj fine por vidi sian kuzon Michel Frésard, la instruisto, kiu iniciatis la esperanto-kurson en Les Bois.

La latinisto Charles Ecabert malkovris tuj la lingvan kaj etikan valorojn de esperanto. La entuziasmo de la gelernantoj kaj de iliaj instruistoj lin impresis, same kiel la prelegoj de la du famaj esperantistaj pioniroj Privat kaj Bovet. Dum la tuta daŭro de la ekspozicio la latina profesoro asidue partoprenis la esperanto-kurson de la merkredaj posttagmezoj. Kaj dum ses monatoj mi havis la privilegion esti lia profesoro. Se mi kapablis al li iom instrui la internacian lingvon kaj ties literaturon, mi samtempe profitis pri liaj stilistikaj instruoj.

Post unu jaro en la sama urbo ni reorganizis manifestacion sub la nomo « Esperanto en la lernejo ». Tiam ĝi okazis en la latina lernejo en la klasejo de Charles Ecabert kaj la prelegisto estis li mem. Siajn kolegojn kaj direktorojn li elokvente instigis vidi en esperanto lingvon instruendan en ĉiuj lernejoj, kaj ĉefe en la latinaj. La frukto de tiu entuziasma prelego estis malfermo de esperanto-kurso en la latina lernejo.

En la printempo 1961 Charles Ecabert fariĝis la prezidanto de la asocio Esperanto-edukistaro de Svislando. Ekde tiu momento li dediĉis grandan parton de sia apudprofesia laboro al tiu malgranda movado. En la aŭtuno de tiu jaro okazis en mia vilaĝo la manifestacio « Esperanto en la lernejo ». Pli ol 400 personoj alkuris por aŭskulti la faman poresperantan latiniston kaj liajn gelernantojn.

Sinjoro Ecabert estis tre ŝatata preleganto. Lin invitis multaj esperanto-grupoj kaj seminarioj. Ekzemple dum la somero 1961 li jam donis en esperanto kurson pri la greka humanismo en la seminario de Münchwiller. Estas tie, ke li kun laŭdo trapasis la superan diplomon. Lastan jaron 1962 li prelegis dum la internacia ferio-semajno de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj organizita en Oberbalmberg.

Edmond Privat, kiu loĝis en la sama urbo Neuchâtel, vidis en la vigla kaj veroserĉanta Charles Ecabert sian plej kapablan anstataŭonton por siaj elsendoj de la svisa kurtonda radiostacio. En tiu printempo nia vigla samideano akceptis ankaŭ repreni la redakcion de nia gazeto *Svisa Espero*. Sed ho ve. Nur kelkajn elsendojn li povis diri kaj nur tri numerojn de nia gazeto li havis la tempon redakti, ĉar subita fulmotondra malsano lin haltigis la 25-an de oktobro en lia aktiveco. Lia terurita edzino devis lin transportigi al la hospitalo, kie li kuŝis paralizita dum pli ol sep semajnoj pro virusa ankoraŭ nekonata malsano, ĝis kiam la morto lin forrabis malgraŭ la flego de lia edzino kaj de sindonemaj kuracistoj. Dum tiuj longaj tagoj kaj noktoj li restis senkonscia. Ni imagu la doloron de liaj edzino kaj du filinoj, kiuj ĉiutage esperis je resaniĝo kaj fine, la 15-an de decembro, komprenis, ke tiu espero estis nur iluzia. Ni restas senvortaj por esprimi al tiuj tri virinoj nian kundoloron kaj kunsuferon kaj tiujn de la tuta esperantistaro, kiu havis la ŝancon kontaktiĝi dum tiuj tri jaroj kun Charles Ecabert : ni pensas al la vidvino de Edmond Privat, kiu vidas la helpanton de sia edzo malaperi preskaŭ sammomente kiel li, ni pensas al la svisaj edukistoj, al la gelegantoj de *Svisa Espero*, al vi,

geaŭdantoj, al ĉiuj, kiuj samideanis kun li. Ni pensas ankaŭ al liaj gelernantoj kaj gekolegoj, por kiuj li sin tiom dediĉis.

Fulmotondra esperantista vivo, kiu estis esperplena. Fulmo-tondra morto, kiu nin senesperigas. Sed dank'al lia ekzempla sindono tiuj tri jaroj restos por la svisa esperantistaro lumigitaj de lia fervorega personeco.

Vi aŭdis prelegon en esperanto el Svislando. Parolis Claude Gacond, la sekretario de Esperanto-Edukistaro de Svislando, pri la esperantista vivo de Charles Ecabert. Ĝis reaŭdo !

-oOo-